

ABORTIGITAJ INFANOJ MANKAS

Kun publicisto Stefan Baier interparolas agenturo Kath-net

Ŝajnas, ke jam eĉ Eŭropa Unio rekonis, ke Eŭropo eniris demografie en seneliran straton. Sociala komisararo Ŝpidla diris: „La populacio malkreskas. Nombro de pli ol 80 jaraĝaj eksplodos el 18 je 35 milionoj en la jaro 2050.

En la tuta Eŭropo dum lastaj 150 jaroj plilongiĝis la perspektivo de la ĝisvivo je duoblo. Dankon al Dio! Sed dum lastaj tridek jaroj havas ĉiuj nacioj en Eŭropo katastrofan naskokvanton. Konsekvenco: Eŭropo griziĝas. Dum 100 jaroj ekde la jaro 1950 ĝis la jaro 2050 kreskos kvoto de pli aĝaj ol sesdek jarojn nur en Aŭstrio el 15 % je 36 %, dum la indikilo de la naskokvanto malkreskis je 72 %. Tio signifas: pli da pensiuloj kaj malpli da laboraktivuloj, do kreskantaj pretendoj por la sanitara servo, pensioj, sed malkreskanta enspezo, malkresko de la ekonomia forto je duono.

Kial havas Eŭropanoj dum lastaj jardekoj ĉiam malpli da infanoj?

Nia sociala sistemo premiigas egoisman pensmanieron kaj seninfanecon, sed punas kreskon de la familio kaj riĉecon de la infanoj. La maljuniĝanta Eŭropo bezonas nenion tiel urĝe kiel eksplodon de la naskokvanto, sed la infanoj estas por la junaj paroj la plej granda risko de la malriĉeco. Tio estas paradokso! Samtempe elmergiĝis mentalito de la seninfaneco eĉ al la infanoj malamikeca: naskiĝas malmulte da infanoj, ĉar la gepatroj sin kontraŭ la infanoj defendas. Naskiĝas malmulte da infanoj, ĉar multaj infanoj estas abortigitaj. Amasaj abortigoj gvidas Eŭropon al demografia katastrofo.

Hodiaŭ mankas tiuj infanoj, kiuj estis antaŭ tridek jaroj abortigitaj.

Vi avertas antaŭ barbarismo de la socio.

Milionoj da infanoj estis en Eŭropo abortigitaj, ĉar la familioj, ŝtatoj kaj socioj onidire ne povis al si la infanojn permesi, ĉar estis preferataj aliaj prioritatoj: kariero, sinrealigo. Kaj ĉu ni nun povas atendi, ke memvole deprimitaj generacioj rezignos pri sia egoismo kaj zorgos pri la kreskantaj vicoj da maljunaj homoj? Debato pri eŭtanazio estas pli malfrua konsekvenco de la ideologio de la sinrealigo kaj la pensmaniero de amuzado. Kiam tiuj el la lastaj jaroj, kiam ankoraŭ estis multaj infanoj, atingis la pensiulan aĝon kaj niaj socialaj sistemoj staras lime de la kolapso, montriĝas al la homamasoj eŭtanazio kiel lasta elirsolvo. Tiun debaton oni volvas en humanismajn argumentojn, simile kiel debaton pri la abortigoj, sed sekvaĵo de ambaŭ estas barbarismo.

Ĉu ekzistas ankoraŭ elirsolvoj el tiu ĉi krizo?

La seninfanecon oni heredas. La infanoj abortigitaj antaŭ tridek jaroj havos neniam infanojn nek nepojn. Ne plu estas post kvin minutoj la dekdua, sed tridek jaroj post la dekdua. Sed ni devas provi ŝanĝon de tiu ĉi trendo. Ni bezonas novajn socialajn, jurajn kaj financajn valorigojn de la infanoj kaj la familioj, pritakson de la patrineco kaj la vivo. Antaŭ ĉio ni devas denove eklerni transpreni la respondecon: por la propra vivo, por la infanoj, por la estonteco de la socio. ■

Kath-net